.

# & La amo estas ŝipo:

< Rekante 21 el 41 batoj por strofo, entute 205 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Anvar Zajsanov (Literatura konkurso Liro, Kaliningrad 2003). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

**(#Melodio:**

<:41> (

o;So /dodo dore mido re do;do LaLa LaTi doLa So o;So LaLa LaLa doLa So do o;do TiTi TiTi Tido re

(#Rekantaĵe: e;So dodo dore mido re do;do LaLa LaTi doLa So o;So LaLa LaLa doLa So do o;do dodo mimi mimi mire do)

)×5 )+

**(&Strofoj:**

'1 La /amo estas du ŝipetoj ; sur vasta oceano – viv'. ; Peladas ilin la tempestoj ; nehaltigeblaj dis, en driv'.

(×:; **Do dancu kune en la ĉeno, ; ni dancu ĝis matena sun' ; kaj ĉiam novaj tagoj venos, ; esperon kaptu do je oportun'**.)

'2 Nur fojaŭdiĝas voĉ' sirena, ; aperas sorĉe brila lum'. ; Kaj ĉion volvas malserena ; nebulo densa. Kio nun? .....

'3 Ĉu plu serĉadi, aŭ despere ; havenon iri? Eble re, ; espere al fortun' sencele ; antaŭen veli, ĝis pere'! .....

'4 Pro kio da al nia sorto ; obeas ni? Ĉu la timem' ; pri la misŝanco nin al bordo ; forlogas? Eble nia mem' .....

'5 trankvilon serĉas, kaj danĝeron ; evitas, volas al kviet'? ; Sed tiam lasu ni esperon, ; ne renkontiĝos la ŝipet'. .....)